



Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 115 (2/2021) ♦ 30-a jaro (tria serio) ♦ ISSN 1385-2191

*Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de
la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*

www.esperantic.org esfacademic.org esfconnected.org
@esperanticsf @esfacademic www.facebook.com/esperantic

ENHAVO

Venontaj eventoj 3

Lingvo kaj migrado: Sperto kaj memoro	3
Javier Alcalde ĉe EHESS	3
Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado en Mezameriko kaj Karibio	3
Alvoko por la 43-a Esperantologia Konferenco	4
Nitobe-simpozio: Lingvo, konflikto kaj sekureco	5
Transnaciaj emancipaj praktikoj prilumataj de la Esperanta paradigmo	5
Germana Asocio pri Aplikata Lingvistiko (GAL)	6
6-a Saarbrücken-konferenco pri instruado de fremdaj lingvoj	6
31-a GIL-konferenco	6
Konferenco 2021 de CEL/ELC	6
Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado 2021	7
Tradukado kaj interpretado: praktikoj, procezoj, retoj	7

Raportoj 8

Prelego pri lingvopolitikaj evoluoj en la EU	8
Esperanto: La lingvo de espero de L. L. Zamenhof por la rusaj judoj kaj la mondo	8
Universitata publika agado en Turkujo	8
Regionaj Esperanto-kursoj organizitaj de IKEF-Ĉinio	8

Ĝeneralaj novaĵoj 10

Demandaroj cele al la ILEI-Simpozio	10
Stipendioj Marjorie Boulton	10

Voĉdono pri la ĉefaj defioj kaj celoj de edukado	11
Esperanta Universitato	11
Universitato Adam Mickiewicz	12
Eŭropo serĉas planlingvajn tradukistojn	12
Bitoteko ĉe Europeana	12
Institucio Hodler	12
La Fonduso por Endanĝerigitaj Lingvoj	13
Esperanto-Historio	13

Libroj 14

El la Interlingvistika Simpozio	14
<i>Esperantologio</i> bonvenigas recenzojn pri libroj	14
Anarkiismo, katalunismo kaj esperantismo, kiuj elvokas fascinajn rolojn	15
Antologia skizo de la persa literaturo	16
Plurlingvaj medioj en la granda milito	16
<i>La falo de lingvo en la epoko de la angla</i>	17
Lingvoinvento en Lingvosciencia Pedagogio	17
Oftaj demandoj pri homaj rajtoj kaj klimatsanĝiĝo	18
<i>La leviĝo de la angla: Monda politiko kaj la potenco de lingvo</i>	18
<i>Lingvaj problemoj en kompara edukado: Politiko kaj praktiko en plurlingva edukado bazita sur nesuperregaj lingvoj</i>	18

Artikoloj 19

“Vortoj por ‘virino’ en aprioraj artefaritaj helplingvoj de la 19-a kaj 20-a jarcentoj”	19
“Relikvoj de alia estonteco”	19
“Epistemologia diverseco kaj la demando pri lingvafrankao en scienco kaj filozofio”	19
“Logiko kaj aksiomaro en la kreado de Latino sine Flexione”	19
“Rakonto pri du lingvoj”	20
“Ĉu nenies aŭ komuna? Pri naturaj kaj artefaritaj miksitaj lingvoj”	20
“Du lingvafrankaoj? Socia inkluziviĝo per la angla kaj Esperanto”	20

Aliaj eldonajoj 21

Esperanto Por UN	21
Lingvo kaj la Unuiĝintaj Nacioj: bibliografio kaj disponaĵaro	21
Italaj tezoj kaj disertacioj	21
Biblioteko de GDREA	21
<i>ESF Connected</i> : Lastatempaj blogaĵoj	22

Stipendioj de ESF 23

VENONTAJ EVENTOJ

Lingvo kaj migrado: Sperto kaj memoro

Universitato Princeton (rete), 19-a de aprilo – 1-a de majo 2021

<https://migration.princeton.edu/symposium/program>

Interfaka simpozio, kiu kunvenigas humanistojn kaj socisciencistojn, surkampajn laboristojn kaj politikfarantojn, artistojn kaj verkistojn por kunkpensi pri migrantoj kiel elturniĝemaj uzantoj, interpretantoj kaj kreantoj de lingvo.

Lingvo estas faktoro esenca sed nesufiĉe esplorita en la vivoj de migrantoj, enmigrantoj kaj rifuĝintoj. Ĝi rekte efikas al la spertoj kaj elektoj de individuoj delokigitaj de milito, teroro aŭ naturaj katastrofoj kaj al la decidoj faritaj de agentoj, kiuj liveras (aŭ ne sukcesas liveri) helpon, servojn kaj statuson. Distilite per memoro, ĝi formas la fikciojn, poemojn, rakontojn, filmojn kaj kantotekstojn, en kiuj migrantoj esprimas perdon kaj delokiĝon, la tradukon de historio kaj kulturo, kaj la problemojn de identeco.

Javier Alcalde ĉe EHESS

Javier Alcalde estos vizitanta profesoro ĉe EHESS (Skolo pri Progresintaj Studoj en la Sociaj Sciencoj) en Parizo ĉi-printempe. Li prezentos tri prelegojn kadre de diversaj esplorseminarioj: “Pioniro de internaciismo: Esperanto kaj la Unua Mondmilito” (12-a de aprilo), “Esperanto en Orienteŭropo ĉirkaŭ la Dua Mondmilito” (10-a de majo) kaj “Esperanto, Latino de la laboristoj” (26-a de majo). La prelegoj kaj diskutoj okazos en la franca lingvo. Se vi ŝatus ĉeesti la Zoom-kunvenojn, bonvolu kontakti: militrakonto.UMR8560@cnrs.fr

Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado en Mezameriko kaj Karibio

<https://inil.ucr.ac.cr/plple21-esperanto/>

<https://udecr.zoom.us/meeting/register/tZErd-CppjwpG9EGfDRGh-SBbGdSS6ETGPgG>

La Instituto pri Lingvistikaj Esploroj de la Universitato de Kostariko invitas vin partopreni en la “Seminario pri Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado en Mezameriko kaj Karibio: Realaj kaj Bezonaj”. Tio okazos de la 6-a de majo ĝis la 24-a de junio, kaj estos parto de la oficialaj eventoj okaze de la “Ducentjariĝo de la Sendependeco de Kostariko” (15-an de septembro 1821). Hispanlingvaj, anglalingvaj kaj esperantlingvaj informoj kaj programo estas konsulteblaj rete.

La seminario okazas en kunlaboro kun ESF. Prelegoj okazos hispane aŭ angle.

- ◆ Carla Amorós Negre, Universidad de Salamanca
“Políticas lingüísticas en torno al multilingüismo en la Unión Europea”
- ◆ Joseph Farquharson, Universidad de las Indias Occidentales
“Corpus Planning for the English-related Creoles of the Caribbean: Progress and Prospects”
- ◆ Michele Gazzola, Ulster University
“The value of languages in the labour market (La valoro de lingvoj en la labormerkato)”
- ◆ Federico Gobbo, University of Amsterdam
“Esperanto in the web after Covid: current challenges and opportunities for a linguistic community of practice”
- ◆ Grant Goodall, Universidad de California en San Diego
“La planificación y el aprendizaje: los extraños destinos del Volapük, Esperanto e Interlingua”
- ◆ Jannis Harjus, Universidad de Innsbruck
“Política lingüística en el español peninsular: el caso del andaluz”
- ◆ Carlos Sánchez Avendaño, Universidad de Costa Rica
“La conceptualización de la revitalización lingüística”
- ◆ Víctor Manuel Sánchez Corrales, Universidad de Costa Rica
“Códigos de la lengua española y política lingüística panhispánica ASALE”
- ◆ René Zúñiga Argüello, Universidad Nacional / Purdue University
“Las distintas realidades de los criollos de Nicaragua y Costa Rica”

Alvoko por la 43-a Esperantologia Konferenco

Guilherme Fians kaj Orlando Raola

La organizantoj alvokas ĉiujn fakulojn, esploristojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la Esperantologia Konferenco 2021, sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

La 43-a Esperantologia Konferenco okazos virtuale, kadre de la Universala Kongreso de 2021. Ĝi pritraktos temon aktualan kaj gravan, kiu ankaŭ tuŝas la formon de la konferenco mem: “Defioj por lingvoj kaj komunikado en mondo virtuale kunligita”.

La konferenca temo rekte rilatas al la nuna situacio de la mondo – t.e. virtualaj versioj de la Universala Kongreso, Esperanto-renkontiĝoj, kiuj pli ofte okazas rete, juna esperantistaro kiu plifortiĝas pro retaj lingvo-kursoj kaj, plej grave, lingvouzado kiu ŝanĝiĝas pro la fakto ke distanco ne same gravas kiam temas pri ne-vidalvida komunikado. Krome, ĉi tiu temo same bonvenigas esploristojn, kiuj analizas ĉeeston komunikadon en mondo ĉiam pli virtuala.

La konferenco okazos en tri partoj: la unua konsistos el dudek-minutaj prezentoj pri referaĵoj – prefereble ĉirkaŭ la konferenca temo, sed ne nepre. La dua parto temos pri mallongaj tri-minutaj prezentoj, surbaze de unu bildo, pri esploroj rilataj al la ĉefa temo aŭ pri Esperantologio pli ĝenerale. La tria parto enhavos rondan tablon, malferman al la partopreno de ĉiuj ĉeestantoj, pri lingvo-uzado, aktivado kaj esplorado dum la kronviroza pandemio.

Ni invitas ĉiujn fakulojn – aparte junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn – sendi proponojn pri referaĵoj (por la unua parto de la konferenco) kaj/aŭ pri mallongaj prezentoj (por la dua parto). La proponoj – enhavantaj inter 150 kaj 200 vortoj – devas esti sendataj, kiel eble plej baldaŭ, al la retadreso de la du organizantoj: guilhermefians@gmail.com kaj oraola@gmail.com. Ni ankaŭ petas ke la proponantoj indiku ĉu ili emas prezenti nur ĉeeste, nur virtuale aŭ en ambaŭ okazoj. La limdato por la proponoj estas la 14-a de majo 2021.

Ni antaŭĝojas ricevi vian kontribuon kaj revidi vin dum la Esperantologia Konferenco!

Nitobe-simpozio: Lingvo, konflikto kaj sekureco

<https://esfacademic.org/en/nitobe-2021/>

La Nitobe-simpozion kunorganizas la Universitato de Ulstero (Belfasto) kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kun financa subteno de Esperantic Studies Foundation (ESF). Pro la nuna situacio, la simpozio okazos kiel virtuala evento tra du tagoj: 26–27-a de julio 2021.

- ◆ Lingvopolitiko en Nordirlando kaj implicoj por potencdivido en kontestaj socioj
- ◆ Lingvo en homsuferaj krizoj kaj iniciatema packonstruado en tutmonda kunteksto
- ◆ Lingvo en kunteksto de sekureco kaj konfliktsolvo en Eŭropo
- ◆ Antaŭenigi lingvan justecon

Bonvolu ofte viziti la retejon por resti ĝisdata pri programŝanĝoj kaj aliĝado.

Transnaciaj emancipaj praktikoj prilumataj de la Esperanta paradigmo

Berlin, 6–8-a de septembro 2021

<https://esperparadigma1.sciencescall.org/>

Laborsesio pri “Transnaciaj emancipaj praktikoj prilumataj de la Esperanta paradigmo. Spertoj de la longa 20-a jarcento” kunvenigos magistriĝajn studentojn, doktoriĝajn kandidatojn kaj spertajn esploristojn. Tio estas kuninicio de EHESS kaj la Universitato de Bonn, la Centro Marc Bloch en Berlino kaj la Universitato de St. Andrews kun financa subteno de la Franca-Germana Universitato.

Germana Asocio pri Aplikata Lingvistiko (GAL)

15–17-a de septembro 2021

<https://gal-wue21.de/programm-2/>

15 sesioj, inkluzive de: interkultura komunikado kaj plurlingvaj interparoloj; cifereca interkultura komunikado; leksikografio; amaskomunikado; (post-)pandemia amaskomunika lingvoscienco; plurlingvismo en lerneja, profesia kaj universitata trejnado kaj en supera edukado; migrisma lingvoscienco; tradukaj kaj interpretaj studoj.

6-a Saarbrücken-konferenco pri instruado de fremdaj lingvoj

27–29-a de oktobro 2021

<https://sites.google.com/view/6scflt-6sft-2021/registration>

Ĉeftemo: Komunikado sen limoj – instruado, lernado kaj parolado de la lingvoj de la mondo.

Projekto de ALTE, la Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo, kun kiu UEA kaj ILEI tenas rilatojn tra pluraj jaroj.

Aliĝdato por kontribuontoj kaj prezentontoj: 30-a de junio 2021.

Asocioj, institucioj, ktp estas alvokitaj por sesioj kaj kunlaboro.

31-a GIL-konferenco

12–14-a de Novembro 2021

<http://www.interlinguistik-gil.de/wb/pages/neuigkeiten.php>

La jara konferenco de Gesellschaft für Interlinguistik (Societo por Interlingvistiko) okazos en novembro, dediĉita al la temo “Planlingvoj kaj arto”, inkluzive de prelego de la aŭstra verkisto Clemens Setz (*La abeloj kaj la nevidebla*). Eblas aliĝi per la GIL-retejo ĉe la adreso ĉi-supre. Oni stipendios la ĉeeston de junaj lingvosciencistoj.

Konferenco 2021 de CEL/ELC

Lingvoj kaj rajtoj por inkluzivema socio

Antverpeno, 2–3-a de decembro 2021

<http://www.celelc.org/>

Alvoko por referaĵoj – la organizantoj invitas proponojn por 20-minutaj prezentoj aŭ afiŝoj, en la angla aŭ la franca, enfokusigante la temon de lingvo, rajtoj kaj aliro al servoj.

Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado 2021

<https://ikiko.civencia.io/ikiko/>

Teamo de esperantistoj, kun partopreno de neesperantistoj, organizas jam de monatoj la internacian kongreson IKIKO 2021 por decembro.

La temo estas la interkultura komunikado ekde vasta vidpunkto. La evento estos plurloka, realiĝante per la partopreno de pluraj memstaraj sidejoj en la mondo. Ĝi estos plurlingva. Unu el ĝiaj celoj estas fortigi la gepatrajn lingvojn, kiuj estas elektitaj de la sidejoj. Ĝi estos plurspeca. Unuflanke okazos la scienca spertaro, kiu sendos artikolojn al scienca revuo. Aliflanke estos renkontiĝo de uloj kaj komunumoj. Ĝi estos plurtavola. Dum sinsekvaj 108 horoj, partoprenantoj havos la eblon ĝui, instrui kaj lerni per pluraj tavoloj de agadoj. Ĝi estos hibrida. Oni povos partopreni per fizikaj ĉeestaj spertoj, miksante kun virtualaj eventoj.

Tradukado kaj interpretado: praktikoj, procezoj, retoj

Vieno, 17–19-a de februaro 2022

<https://fireti.univie.ac.at/>

La esplorgrupo Socio-Kognaj Tradukaj Studoj: Procezoj kaj Retoj (socotrans) ĉe la Centro por Tradukaj Studoj ĉe la Universitato de Vieno ĝojas anonci Internacian Konferencon pri Surkampa Esplorado de Tradukado kaj Interpretado: Praktikoj, Procezoj, Retoj (FIRE-TI), okazontan en Vieno. Oni alvokas prezentoproponojn.

RAPORTOJ

Prelego pri lingvopolitikaj evoluoj en la EU

István Ertl, 25-a de februaro 2021
<https://www.youtube.com/watch?v=KydrK3Llq-M>

La prelego okazis en Esperanto, sed francaj subtekstoj estas nun disponeblaj:

https://www.youtube.com/embed/KydrK3Llq-M?hl=fr&cc_lang_pref=fr&cc_load_policy=1&start=1

Esperanto: La lingvo de espero de L. L. Zamenhof por la rusaj judoj kaj la mondo

Brigid O’Keeffe, 12-a de aprilo 2021
<https://themonmouthjournal.com/zoom-meeting-to-discuss-origination-of-esperanto-language-p10918-148.htm>

Brigid O’Keeffe estas asocia profesoro pri historio ĉe Kolegio Brooklyn. Ŝi estas la aŭtoro de *Esperanto kaj lingvoj de internaciismo en revolucia Rusujo* (Bloomsbury, June 2021).

Universitata publika agado en Turkujo

Kadre de la prezenta serio de “Simpozio pri Kultura Memoro” organizita de Esplorcentro pri Historia kaj Kultura Heredaĵo de la Universitato Hacettepe (HÜTKAM), okazis frue en februaro informplenaj prezentaĵoj:

- ◆ D-ro kaj universitata preleganto s-ino Başak Aray faris prezenton pri “Diskutoj pri Internacia Helplingvo” (ĉefe pri Esperanto).
- ◆ D-ro s-ino Pınar Sel faris prezenton pri “La historio de Esperanto en Turkio”.

En la prezentoj partoprenis preskaŭ 100 homoj, kiuj plejparte estis akademianoj. Ili estis malfermitaj al ĉiuj kaj daŭris preskaŭ 2 horojn en la turka lingvo pere de la platformo Zoom.

Regionaj Esperanto-kursoj organizitaj de IKEF-Ĉinio

Ludoviko ZHAO Chenghua prelegis pri regionaj Esperanto-kursoj organizitaj de IKEF-Ĉinio. La filio de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio organizas la instruadon en regionoj – norda, orienta, suda, okcidenta kaj centra – kun pli ol 200 komencantoj el 22 provincoj kaj urboj.

Krom tio, IKEF-Ĉinio okazigis Esperanto-kursojn en ĉinaj universitatoj, ekzemple: s-ro Longarko Z.C.S., prezidanto de IKEF-Ĉinio en Jiangsu-a Teknologia Universitato; kaj s-ro Orientalo C.X.D. en Shanxi-a Profesia kaj Teknika Kolegio. Ĉirkaŭ 800 studentoj partoprenis iliajn lecionojn kun studpoento. La plej laste, la 19-an de marto 2021 en Shanxi-a Profesia kaj Teknika Kolegio oni refoje organizas Esperanto-kurson por la nova semestro, kaj nun tie lernas 53 studentoj.

ĜENERALAJ NOVAĴOJ

Demandaroj cele al la ILEI-Simpozio

<https://forms.gle/V1hwXXEvCWqPLQmi8>

<https://forms.gle/qLUvkWGtdz3ERuw7>

ILEI kunlabore kun ESF kaj CED kolektas informojn pri agadoj kaj sintenoj en universitatoj kaj aliaj institucioj de supera edukado kaj scienca esplorado, kie:

- a) oni instruas Esperanton kaj/aŭ interlingvistikon kaj/aŭ esperantologion;
- b) Esperanto-parolanto(j) instruas aŭ studas en aliaj fakoj (ekz. matematiko, ekonomio, historio);
- c) oni esploras pri Esperanto kaj/aŭ interlingvistiko kaj/aŭ esperantologio;
- ĉ) Esperanto uzatas ajnmaniere por la eduka kaj/aŭ scienca laboro;
- d) hejmas libroj en kaj/aŭ pri Esperanto en universitataj bibliotekoj.

La kolektotajn informojn oni celas prezenti dum la ILEI-Simpozio, kiu okazos virtuale, je 12–13-a de aŭgusto 2021, enkadre de la 54-a Kongreso de ILEI (7–14-a de aŭgusto).

Estis preparitaj du demandaroj – unu por esperantistaj universitatoj (Demandaro por esperantistaj universitatoj) kaj unu por ne-esperantistaj universitatoj, kiuj tamen interesiĝas pri Esperanto; ĉi tiu lasta aperos en diversaj lokaj lingvoj (anglalingva versio: “The Relevance of Esperanto in Universities Today”, ĉe la dua ligilo ĉi-supre).

Bonvolu mem plenskribi, kaj disvastigi al kolegoj la ligilojn. Dankon!

Stipendioj Marjorie Boulton

<https://www.esperantic.org/eo/stipendioj-marjorie-boulton/>

Esperantic Studies Foundation (ESF) anoncas sian ĉi-jaran konkurson por esplorstipendioj pri la historio, lingvistiko, sociologio aŭ etnografio de Esperanto aŭ fenomenoj Esperanto-rilataj. Ankaŭ interfakan esploradon ESF bonvenigas kadre de la konkurso.

La stipendioj honoras la memoron de Marjorie Boulton, fekunda aŭtoro de teatraĵoj, poemoj kaj prozo en Esperanto kaj ankaŭ de la ĉefa anglalingva biografo de Ludoviko Lazaro Zamenhof. La stipendion oni povas utiligi samtempe kun aliaj premioj kaj stipendioj. Ĝi estas nerenovigebla. Ne ekzistas geografiaj limigoj; kandidatoj en kaj de ajna lando povas partopreni la konkurson. ESF estas neprofitcela organizaĵo, kiu alte taksas inkluzivadon kaj diversecon kaj ne diskriminacias surbaze de raso, koloro, lingvo, landa deveno, handikapo, religio, aĝo, seksa orientiĝo aŭ genra esprimo.

ESF celas aljuĝi stipendiojn de po 10.000 USD en du kategorioj laŭ la esploristo:

Kategorio 1. Stipendio por la *esplorado de doktoriĝanto*, kiu jam komencis aŭ tuj komencos sian disertacion.

Kategorio 2. Stipendio por la *esplorado de jama doktoro*, kiu lastatempe doktoriĝis per sia disertacio kaj bezonas subtenon al ligitaj esploroj kaj eldonado.

Pliajn detalojn pri postuloj, kondiĉoj kaj kandidatiĝoj oni povas trovi ĉe la ĉi-supra adreso. La limdato por kandidatiĝoj estas la 1-a de Junio 2021. ESF celas anonci la stipendiitojn en Julio 2021.

Voĉdono pri la ĉefaj defioj kaj celoj de edukado

Unesko petas opiniojn, ankaŭ per Esperanto

<https://uea.org/gk/943a1>

La ĉefa celo de Unesko estas kontribui al paco kaj sekureco en la mondo per kunlaborado inter nacioj per edukado, scienco, kulturo kaj komunikado. Per tio oni antaŭenigas universalan respekton al justeco, al la regado de leĝo kaj al homaj rajtoj, fundamentaj liberecoj kaj toleremo, kiuj estas konfirmitaj por la popoloj de la mondo, sendepende de raso, sekso, lingvo aŭ religio, laŭ la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj.

Unesko publikigis 1-minutan enketilon en 17 lingvoj, inkluzive Esperanton danke al la iniciato kaj traduko de Renato Corsetti.

Esperanta Universitato

De longe multaj esperantistoj revas la ekziston de Esperanta Universitato. Ne temas pri institucio, kies celo estas la instruo de Esperanto aŭ la diskonigo de la Esperantaj kulturo, historio kaj komunumo. Temas pri vera universitato, kiu instruas kaj esploras pri diversaj disciplinoj kaj tion faras per Esperanto. Historie facile oni trovas plurajn ekzemplojn de daŭraj agadoj, kiuj iel alproksimas al tia institucio, sed sen fakte trafi ĝin.

Nuntempe realiĝas grupo de universitatanoj per la celo diskuti, kiel atingi tiun revon ĉefe pensante pri neĉeesta realigo. Malgraŭ la longa preciza sperto de siaj grupanoj, la grupo ekpaŝas nun per la retlisto iru@esperantujo.io.

Ambicia celo estas kunpensi kaj kunplani tian institucion. Kaj konkreta engaĝiĝo estas organizi specifan fadenon en la 54-a ILEI-kongreso, kiu okazos inter la 7-a kaj 14-a de aŭgusto 2021 en Benino. Ni klopodas esti laborema, proponema kaj realigema grupo. Se vi volas aldoni vian energion al tiu projekto, bonvole skribu al viko@us.es.

Universitato Adam Mickiewicz

<https://edukado.net/novajhoj?id=849>

La Universitato Adam Mickiewicz (AMU) en Poznano, unu el la plej signifaj polaj universitatoj, ofertas tri-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko kaj esperantologio, kun specialiĝo en la tria jaro i.a. pri instruado de Esperanto. La instruista specialiĝo realiĝas kun la kunlaboro de Edukado.net kaj ILEI. La studado okazos plejparte virtuale.

Partoprenontoj el la tuta mondo povas aliĝi ĝis la 1-a de aŭgusto. Pli frua aliĝo estas bonvena.

Eŭropo serĉas planlingvajn tradukistojn

La buĝeto por 2021 de la Eŭropa Fondaĵo por la plibonigo de la viv- kaj labor-kondiĉoj (Dublino), publikigita en la Oficiala Bulteno de la Eŭropa Unio (2021/C 114/02) je la 1-a de aprilo 2021 enhavas aldonan laŭtempan postenon (rango AD7) kompare kun 2020. Laŭ piednoto al la buĝeta tabelo (p. 10) tiu posteno rilatas al “kunordigo de planlingvaj traduktaskoj”. Kvankam la planlingvo ne estas nomata, de kiam en 2019 laborgrupo de la Fondaĵo starigis tiurilatan (ne-publikigitan) raporton, oni scias, ke temas pri Esperanto. La laborgrupo bazis siajn rekomendojn sur la raporto de profesoro Grin kaj havas la apogon de la franca parlamento (raportis *Libera Folio*).

Bitoteko ĉe Europeana

https://www.europeana.eu/pt/item/299/11013_5217

<https://bitoteko.esperanto.es/>

La cifereca kolekto de la Biblioteko Juan Régulo Pérez en Madrido aliĝis al la eŭropa konsorcio Europeana. La portalo nun kunigas ĉirkaŭ 5000 erojn kun rilato al Esperanto.

Institucio Hodler

<https://www.uea.org/asocio/Hodler>

<https://www.uea.org/pdf/subvencipeta-formularoIH-v25.doc>

Estiĝis pli da aliroj por proponi projektojn. Akiru pli da informoj pri la kondiĉoj kaj ebloj ĉe la adresoj ĉi-supre.

La Fonduso por Endanĝerigitaj Lingvoj

<http://www.endangeredlanguagefund.org/>

Subtenas la dokumentadon kaj revigligon de la endanĝerigitaj lingvoj de la mondo.

“Ĉirkaŭ 7000 lingvoj estas parolataj en la mondo, kaj oni antaŭvidas, ke almenaŭ duono malaperos en la nuna jarcento. La Fonduso por Endanĝerigitaj Lingvoj helpas reteni la tajdon.”

Esperanto-Historio

<https://hal.archives-ouvertes.fr/ESPERANTO-HISTORIO/>

<https://mondmilito.hypotheses.org/>

La kolekto Esperanto-Historio kunigas kontribuojn pri la historio de Esperanto kiel fenomeno socia kaj kultura. Ĝi inkluzivas eldonaĵojn de kolegoj filiigitaj al akademia institucio, kiuj aktivas en la projekto *Literaturo kaj rakontoj pri la Dua Mondmilito* kaj en aliaj lastatempaj esploriniciatoj.

LIBROJ

El la Interlingvistika Simpozio

<https://wydawnictworys.com/category/nowosci>

https://www.youtube.com/playlist?list=PLGDNhxSrlMB-_AHJnJumSq9k7Vvnf93Uf

http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/Barandovska_Interlingvistiko_enkonduko.pdf

Aperis du libroj el la elektitaj kaj prilaboritaj materialoj de la 5-a Interlingvistika Simpozio en la nova eldonserio *Cross-linguistic and Cross-cultural Studies* de la Etnolingvistika Instituto de AMU en Poznano (Pollando):

1. *The Role of Languages in Intercultural Communication / Rolo de lingvoj en interkultura komunikado / Rola języków w komunikacji międzykulturowej* (2020)

2. *The Intercultural Role of Esperanto / Interkultura rolo de Esperanto / Międzykulturowa rola esperanta* (2021)

Ili estas troveblaj kaj elŝuteblaj en la retejo de la Eldonejo RYS (ĉe la unua adreso ĉi-supre).

Multaj prelegoj de la simpozio rigardeblas en la Jutub-kanalo de la simpozio (dua adreso).

Kaj la unua lernolibro de la Interlingvistikaj Studoj, *Interlingvistiko* de Vera Barandovska-Frank, estas elŝutebla kiel PDF (tria adreso).

Esperantologio bonvenigas recenzojn pri libroj

<https://www.esperantic.org/eo/esperantologio/>

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9824>

Esperantologio / Esperanto Studies (EES) estas faka revuo pri ĉiuj fenomenoj rilataj al Esperanto. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de Esperanto kaj ankaŭ recenzojn pri libroj. Ĝi publikigas materialon en Esperanto aŭ en la angla lingvo, sed estas principe malferma al materialo ankaŭ en aliaj lingvoj. Sub la aŭspicio de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj) la numero 9 (1) de EES jam estas rete disponebla kaj estas papere mendebla ĉe la eldonejo Mondial aŭ la libroservo de UEA.

Redaktata de Humphrey Tonkin kaj Guilherme Fians, EES nun bonvenigas kontribuojn en formo de referaĵoj kaj recenzoj. La revuo aparte akceptas recenzojn pri libroj jam por sia venonta numero.

Recenzoj prefere havu inter 1000 kaj 1700 vortojn (proksimume 2–4 paĝojn) kaj, plej grave, temu pri kritikaj recenzoj, ne nur priskribante la libro-enhavon, sed ankaŭ analizante ĝin kritike. La recenzata libro povas esti en iu ajn lingvo, tiel ke la recenzo helpu informi

parolantojn de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ bonvenigas recenzojn, kiuj komparas aŭ kunekzamenas pli ol unu samspecan libron.

Kelkaj libroj konsiderindaj por recenzado estas:

- ◆ Anderson, Stephen R; Saussure, Louis de. 2018. *René de Saussure and the theory of word formation*. Berlino: Language Science Press.
- ◆ Caligaris, Irene. 2016. *Una lingua per tutti, una lingua di nessun paese. Una ricerca sul campo sulle identità esperantiste*. Torino: Aracne: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9460>.
- ◆ Collinson, William E. 2019. *La Homa lingvo / Human language*. Rotterdam: UEA: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9720>.
- ◆ Duc Goninaz, Michel; Roux, Klaŭdo (red.). 2020. *Plena ilustrita vortaro de Esperanto*, nova eldono. Parizo: SAT.
- ◆ Fettes, Mark. 2020. *Ne estas fido nur. Elektitaj artikoloj kaj paroladoj el la jaroj 2010–2019*. Moskvo: Impeto: http://impeto.trovu.com/mark_fido.
- ◆ Goes, Heidi. 2018. *Movadaj insuletoj. Vivo kaj agado de esperantistoj en Indonezio*. Roterdamo: UEA: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9619>.
- ◆ Heller, Monica; McElhinny, Bonnie. 2017. *Language, capitalism, colonialism: Toward a critical history*. Toronto: University of Toronto Press.
- ◆ Maradan, Mélanie. 2021. *Uncertainty in deliberate lexical interventions. Exploring Esperanto speakers' opinions through corpora*. Berlino: Frank & Timme.
- ◆ Moret, Sébastien (red). 2019. *Interlinguistique et espérantologie. Cahiers de l'ILSL n° 61*. Laŭzano: Université de Lausanne;

La akceptindaj recenzoj ne limiĝas al tiuj libroj. Se vi interesiĝas verki recenzon, bonvolu anticipi kontakti la redaktorojn per la retadreso tonkin@hartford.edu kaj guilhermefians@gmail.com, al kiuj vi same direktu demandojn laŭbezone. Ne estas limdato por la ricevado de kontribuoj.

Anarkiismo, katalunismo kaj esperantismo, kiuj elvokas fascinajn rolulojn

<https://serhistorico.net/2020/12/07/un-anarquisme-catalanisme-i-esperantisme-que-evoquen-personatges-fascinants-xavier-alcalde/>

Tio estas recenzo de Javier Alcalde pri *La vida promesa* (La Campana, 2020), la lasta romano de Enric Larreula. Temas pri kataluna familio, kiu klopodas krei liberecanan komunumon en Brazilo dum la 1930-aj jaroj. Ili estas vegetaranoj, esperantistoj, ateistoj kaj naturistoj. Alcalde ankaŭ prezentas plurajn historiajn figurojn, kiuj travivis similajn aventurojn: Paul

Berthelot, Filomeno Cavernido, Anna Rosselló, Trinitat Garcia, Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, Eduard Vivancos kaj Jaume Grau Casas.


Antologia skizo de la persa literaturo

Said Baluči

<http://persa.trovu.com/>

Jen la unua fojo, ke la persa literaturo aperas en tiu serio. Laŭ atentigo de Giridhar Rao en sia antaŭparolo, “jam en 2004 Abel Montagut sciigis nin pri la neegaleco en la monda kultura trafiko de tradukado”. Inter la tradukaĵoj listigitaj en la *Index Translationum* de Unesko, la fontlingvoj por 70% el ili estis nur kvar: la angla, rusa, franca kaj germana.

Ene estas tradukoj kaj klarigoj de prozspecimenoj de 33 aŭtoroj aŭ libroj (102) kaj poemspecimenoj de 24 poetoj. Ĝi aperis kiel n-ro 58 en la renoma Serio Oriento-Okcidento de UEA, sub aŭspicioj de UEA en konsulta partnereco kun Unesko.



Plurlingvaj medioj en la granda milito

redaktis Julian Walker, Christophe Declercq (Bloomsbury)

<https://www.bloomsbury.com/uk/multilingual-environments-in-the-great-war-9781350141353/>

<https://books.google.com/books?id=cElaEAAAQBAJ&pg=PA44>

Ĉi tiu libro esploras la diversajn manierojn, kiel oni uzis lingvon por provi kompreni la Unuan Mondmiliton. Proponante pliajn evoluojn en novigema aliro al la studo de tiu konflikto, ĝi evoluigas transnacion vidpunkton pri la militsperto por malkaŝi malpli antaŭvideblajn kampojn de lingvouzo en la milito.

Ĉerpante multe da diversaj lingvoj, inkluzive de Esperanto, la flandra, la itala, la svahila, la portugala, la rumana kaj la turka, *Plurlingvaj medioj en la granda milito* kunigas prilingvajn militspertojn tiel de batalantoj kiel de civiluloj, ligante lingvon kaj literaturon kun lingva analizo pri la rektesco de komunikado.

La libro enhavas la ĉapitron “Pioniroj de internaciismo: Esperanto kaj la Unua Mondmilito” de Javier Alcalde, kiun oni povas antaŭrigardi ĉe la ĉi-supra adreso ĉe *books.google.com*.

La falo de lingvo en la epoko de la angla

Minae Mizumura (tradukis Mari Yoshihara kaj Juliet Winters Carpenter)
Columbia University Press

<http://cup.columbia.edu/book/the-fall-of-language-in-the-age-of-english/9780231163026>

Gajninto de Premio Kobayashi Hideo, *La falo de lingvo en la epoko de la angla* malkaŝas la batalon por konservi la brilon de la propra lingvo en la nuna periodo de regado de la angla lingvo.

Lingvoinvento en Lingvosciencia Pedagogio

Redaktis Jeffrey Punske, Nathan Sanders kaj Amy V. Fountain
<https://global.oup.com/academic/product/9780198829874>

La unua volumo esploranta la uzon de lingvoinvento kaj planlingvoj por pedagogiaj celoj. Ĝi ekzamenas datumojn pri la efikeco de la uzo de inventitaj lingvoj por instruado en diversaj edukaj kunteksto, kaj donas ekzemplojn de taskoj kaj aliroj uzablaj en klasĉambro. Ĝi enhavas kontribuojn de lingvistoj, kiuj rekte kontribuis al la diskonateco de planlingvoj per amaskomunikiloj.

Ĉapitroj de ESF-estrarano Grant Goodall kaj ESF-konsilanto Arika Okrent.

1. Enkonduko (Jeffrey Punske, Nathan Sanders kaj Amy V. Fountain)
2. Aboco de planlingvoj (Nathan Sanders)
3. Burĝonantaj lingvistoj kaj kiel trovi ilin (Arika Okrent)
4. La lingvoscienco de *Arrival*: seppieduloj, surkampa lingvoscienco kaj universala gramatiko (Jessica Coon)
5. Tri planlingvaj projektoj je tri edukaj niveloj (David Adger kaj Coppe van Urk)
6. La fason(ad)o de lingvo (Grant Goodall)
7. Uzi lingvoinventon por instrui tipologion kaj translingvajn universalaĵojn (Matt Pearson)
8. Instrui inventitajn lingvojn al la antaŭdiploma studento: kurso en la fina jaro (Angela C. Carpenter)
9. Instrui inventitajn lingvojn laŭ enkonduka kurso: nekonata teritorio (James A. Berry)
10. Preni lingvokonstruon el la klasĉambro al la komunumo (Carrie Gillon, Edward Delmonico, Randi Martinez kaj Spencer Morrell)
11. La interfakeco de planlingvoj: iri preter lingvosciencan (Nathan Sanders and Christine Schreyer)
12. Instrui la prahindeŭropan kiel konstruitan lingvon (Brenna Reinhart Byrd kaj Andrew Miles Byrd)
13. Lerni pri lingvo per lingvoinvento: “Mi ege fieris pri la lingvo, kiun mi kreis” (Skye J. Anderson, Shannon T. Bischoff, Jeffrey Punske kaj Amy V. Fountain)

14. Konstrui alimondanajn mesaĝojn: Gvidlinioj pri la uzo de ekzolingvistiko en la klasĉambro (Sheri Wells-Jenson and Kimberly Spallinger)
15. Arto en lingvoinvento: Planlingva pedagogio kaj la instruisto kiel aŭtoritatulo (David J. Peterson)

Oftaj demandoj pri homaj rajtoj kaj klimatsanĝiĝo

<https://unesperante.wordpress.com/2021/04/04/oftaj-demandoj-pri-homaj-rajtoj-kaj-klimatsangigo/>

Klimatsanĝiĝo estas la plej granda danĝero por la homaro kaj por la pluvivo de nia mondo. Do, kion oni povas fari? Kion la registaroj devas fari? Kaj la privata sektoro?

Por helpi respondi tiujn demandojn kaj subteni pli bonajn politikojn por la homoj kaj la mondo, la Alta Komisiono de UN por Homaj Rajtoj publikigis ĉi tiun verkon.

La leviĝo de la angla: Monda politiko kaj la potenco de lingvo

R. C. Salomone (Oxford University Press, 2021)

Antaŭmendebla libro ĉi-somere aperonta.

Lingvaj problemoj en kompara edukado: Politiko kaj praktiko en plurlingva edukado bazita sur nesuperregaj lingvoj

Benson, C. kaj Kosonen, K. (red.)

Boston: Brill/Sense

<https://brill.com/view/title/59714>

Ankaŭ aperonta.

ARTIKOLOJ

“Vortoj por ‘virino’ en aprioraj artefaritaj helplingvoj de la 19-a kaj 20-a jarcentoj”

Pal Dipanwita kaj Alan Libert (red.) (Iksad, Ankara, 2021)

En la libro de la 1-a Internacia Kongreso pri Virinaj Studoj, paĝoj 1–5.

“Relikvoj de alia estonteco”

Lilit Dabagian, David Leupold

<https://readymag.com/relicsofanothefuture>

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Interhelpo_\(kooperativo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Interhelpo_(kooperativo))

Pretigita de la esploristoj Lilit Dabagian (University of Central Asia) kaj David Leupold (University of Michigan), tio permesas trarigardi la historion de la industria kvartalo realigita en la 1920-aj jaroj de la esperantista kooperativo Interhelpo en Kirgizlando.

“Epistemologia diverseco kaj la demando pri lingvafrankao en scienco kaj filozofio”

Federico Gobbo kaj Federica Russo

Foundations of Science volumo 25, paĝoj 185–207 (2020)

https://pure.uva.nl/ws/files/45915188/Gobbo_Russo2020_Article_EpistemicDiversityAndTheQuesti.pdf

“Logiko kaj aksiomaro en la kreado de Latino sine Flexione”

Başak Aray

<https://journals.openedition.org/philosophiascientiae/>

Tiu artikolo aperos en *Philosophia Scientiae* kaj estas legebla enrete.

Ĝi sekvas prelegon en la Kongreso pri Logiko, Metodiko kaj Filozofio de Scio kaj Teknologio (CLMPST 2019). ESF ebligis al d-ino Aray ĉeesti tiun konferencon.

“Rakonto pri du lingvoj”

<https://believermag.com/english-esperanto-universal-language/>

Kiel la ĝemelaj historioj de la angla kaj Esperanto – la unua pelita de mondimperismo, la dua inventita de juda oftalmologo – proponas konkurajn idealojn de universala lingvo.

“Ĉu nenies aŭ komuna? Pri naturaj kaj artefaritaj miksitaj lingvoj”

Ewa Lipińska

<https://digijournals.uni.lodz.pl/cgi/viewcontent.cgi?article=1002&context=kpc>

Ĉi tiu referaĵo (en la pola) celas ordigi kaj karakterizi naturajn kaj artefaritajn miksitajn lingvojn.

“Du lingvafrankaoj? Socia inkluziviĝo per la angla kaj Esperanto”

Federico Gobbo kaj László Marác

Social Inclusion (ISSN 2183–2803) 2021, volumo 9, numero 1, paĝoj 75–84

<https://www.cogitatiopress.com/socialinclusion/article/viewFile/3662/3662>

La allogo de lingvafrankaoj estas aparte klara en homoj kun forta tendenco vojaĝadi. Paradoxse, tiaj mondaj lingvoj instigas moviĝemon, sed samtempe ili povas malhelpi socian inkluziviĝon en la gastiga socio, precipe por homoj vojaĝantaj. La artikolo komparas la anglan lingvafrankae kaj Esperanton en la eŭropa situacio, kaj metas la lingvan dimension de socia inkluziviĝo en kadron de lingva facileco, proponante skalon taŭgan por analizi eŭropajn situaciojn.

ALIAJ ELDONAĴOJ

Esperanto Por UN

<http://esperantoporun.org/en/home/>

<http://esperantoporun.org/eo/hejmo/>

La freŝe ĝisdatigita kaj pligrandigita retejo *Esperanto Por UN* pritraktas aktualaĵojn kaj eventojn pri Esperanto, UN kaj Unesko.

Lingvo kaj la Unuiĝintaj Nacioj: bibliografio kaj disponaĵaro

<https://languageandtheun.org/bibliography.html>

Nova bibliografio nun haveblas en la reto (inkluzive PDF-version).

Italaj tezoj kaj disertacioj

<https://esfacademic.org/eo/rimedoj/>

Tri novaj eroj aldoniĝis al la listo de italaj tezoj kaj disertacioj pri Esperanto-rilataj temoj, kompilitaj de Alessandra Madella: n-roj 26, 36, 44.

Konservataj ĉe la Bitoteko de la Itala Federacio kaj papere ĉe la Nacia Biblioteko de Esperanto de Massa.

Biblioteko de GDREA

<https://www.bundesarchiv.de/DE/Content/Artikel/Benutzen/Hinweise-zur-Benutzung/Unterseiten-Buecher/konvent-kataloge-bibliothek.html>

La biblioteko de GDREA (Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR) estas nun rete alirebla.

ESF Connected: Lastatempaj blogaĵoj

<https://esfconnected.org/past-posts/>

Ĉiuj el ĉi tiuj artikoloj estis afiŝitaj kaj en Esperanto kaj en la angla.

- ◆ “Esperantic Studies Foundation 2021 – La ĉefdirektoro ĝisdatigas pri planoj en la nova jaro” / “Esperantic Studies Foundation 2021 – An update on plans in the new year from the executive director”
Chuck Mays (1-a de Februaro 2021)
<https://esfconnected.org/2021/02/01/>
- ◆ “Historio kaj Esperanto” / “History and Esperanto”
Geoffrey Greatrex (12-a de Februaro 2021)
<https://esfconnected.org/2021/02/12/>
- ◆ *Bibliotekoj 2*: “La nacia Esperanto-arkivo en Kroatio” / *Libraries 2*: “The national Esperanto archive in Croatia”
Josip Pleadin (22-a de Februaro 2021)
<https://esfconnected.org/2021/02/22/>
- ◆ “Pioniroj de internaciismo” / “Pioneers of internationalism”
Javier Alcalde (5-a de Marto 2021)
<https://esfconnected.org/2021/03/05/>
- ◆ *Planlingvaj ekskursoj 2*: “Tra la kuniklotruon” / *Conlang Excursions 2*: “Down the Rabbit-Hole”
Simon Davies (15-a de Marto 2021)
<https://esfconnected.org/2021/03/15/>
- ◆ “Pri kio ni parolas/parolu, parolante pri tradukado de Esperanta literaturo?” / “What We (Should) Talk About When We Talk About Translating Esperanto Literature”
Sebastian Schulman (26-a de Marto 2021)
<https://esfconnected.org/2021/03/26/>
- ◆ “LBR: Kreski kun Esperanto – pli ol podkasto” / “LBR: Growing up with Esperanto – more than just a podcast”
Stela Besenyei-Merger (5-a de Aprilo 2021)
<https://esfconnected.org/2021/04/05/>
- ◆ *Bibliotekoj 3*: “La Esperanto-biblioteko kaj arkivo de Massa, Italujo” / *Libraries 3*: “The Esperanto Library and Archive in Massa, Italy”
Michela Lipari (16-a de Aprilo 2021)
<https://esfconnected.org/2021/04/16/>

STIPENDIOJ DE ESF

Esperantic Studies Foundation havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno.

Programo por Interlingvistika Subteno (IS)

Tio estas administrata de internacia komisiono sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi aljuĝas malgrandajn subvenciojn, kutime malpli ol 2000 usonaj dolaroj, por helpi fakulojn kaj jam spertajn studentojn plenumi esplorojn en la fakoj lingvoplanado, interlingvistiko, transnacia lingva politiko, lingva justeco, kaj planlingvoj (inkluzive Esperanton). La subvencioj povas subteni aĉeton de (aŭ aliron al) esploraj materialoj, partoprenon en konferencoj, vojaĝadon al esplorbibliotekoj, subtenon de surkampa laboro, evoluigon de retejoj, kostojn de publikigo, k.s. Subvencioj IS estas aljuĝataj konkurse kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo de la subvencio.

Programo por Ĝenerala Subteno (ĜS)

Tio kovras ĉiujn tri aktualajn prioritatojn de ESF: Esploradon, Edukadon kaj Konservadon. Ĝi estas malferma al individuoj kaj organizaĵoj, inkluzive de universitatoj. Subvenciojn oni aljuĝas konkurse. Kvankam plej multaj subvencioj estas malgrandaj kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo, foje subvencioj estas aljuĝataj por pli longaj periodoj kaj en pli grandaj sumoj. Antaŭ ol peti subtenon, estas konsilinde sendi mallongan mesaĝon al admin@esperantic.org, por demandi ĉu la propono taŭgas. Petoj ĜS estas traktataj de subkomitato de la Estraro de ESF. Petoj ĜS, kiuj tamen kongruas kun la gvidlinioj IS, estos plusendataj al la Komisiono IS.

Limdatoj

Ekzistas tri limdatoj ĉiujare por subvencipetoj, en ambaŭ ĉi-supraj programoj:

- ◆ 31 januaro
- ◆ 30 aprilo
- ◆ 30 septembro

Por pli da informoj, bonvolu viziti: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf>

IpI estas eldonaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191. Paralela anglalingva versio, *Information for Interlinguists (IfI)* estas ankaŭ disponebla. Ĉi tiun numeron redaktis Simon Davies kaj Angela Tellier.

Por ricevi avizojn pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al Angela Tellier ĉe ipi@esperantic.org. Limdato por la venonta numero: 30 junio 2021. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ la angla, aŭ ideale kiel la saman tekston tradukitan en ambaŭ lingvoj. ESF en la reto: <https://www.esperantic.org>, <http://esfacademic.org>, <http://esfconnected.org>, <https://www.facebook.com/esperantic>. Tvitero: @esperanticsf, @esfacademic.

Estraro de CED

Mark Fettes (direktoro), Guilherme Moreira Fians (esperantologio, interlingvistiko), Michele Gazzola (lingvopolitiko), Angela Tellier (universitataj studprogramoj), Orlando Raola (bibliotekoj). <https://uea.org/asocio/CED>